MANIFESTO POR DEMOKRATIIGI EŬROPON

Eŭropo estos demokratiigita post kiam ĝia oligarĥa sistemo estos renversita!

Malgraŭ ĉiuj ĝiaj zorgoj pri inflacio, migrado, popolismo, klimata ŝanĝiĝo, pandemioj, sekureco kaj terorismo, nur unu perspektivo teruras la potencojn de Eŭropo: demokratio! Ili parolas je la nomo de demokratio, sed nur por ĝin nei, ekzorci kaj forigi en la praktika agado. Ili serĉadas koopti, fraŭdi, korupti, mistifiki, uzurpi, manipuli demokration, celante rompi ties energion kaj haltigi ties kapablojn.

Ĉar la regado fare de la eŭropaj popoloj, regado fare de la popolo, estas la komuna koŝmaro al:

- Grandaj teknologiaj firmaoj, grandaj kuracaj firmaoj, bankistoj daŭre savitaj, investistoj, asekuraj entreprenoj, la milita-sekureca industria komplekso, la renaskiĝanta reto de firmaaj interkonsentoj porĉiame malestimantaj la hom-amasojn kaj ties organizitan esprimadon
- Ilia armeo de neelektitaj burokratoj, teknokratoj kaj prem-grupanoj kiuj movas la fadenojn de la registaroj ĝenerale, kaj aparte tiujn de la EU-aj institucioj
- Politikaj partioj alvokantaj liberismon, demokration, liberecon, medio-protektadon kaj socialan justecon, ktp, nur por perfidi siajn plej bazajn principojn kiam ili alvenas ĉe povaj postenoj
- Registaroj kies politikoj de socialismo-por-la-financistoj kaj akra-ŝparemo-por-ĉiuj-aliaj ekbruligas indiĝenan popolismon, kiun tiuj samaj registaroj pretendas kontraŭstari
- Firmao-grupoj kiuj uzas terminojn kiel “daŭripoveco” kaj “nul-emisioj” por daŭrigi la tipan “komercon kiel kutime”, verde-purigante sian tutmondskalan vandalismon
- Komunik-regantoj, kiuj normaligis misinformadon kaj uzadas timigajn novaĵojn kiel armilojn

Ĉe la kerno de la revigliĝanta aŭtoritatismo, samtempe “liberisma” kaj “popolisma”, kuŝas kulpa trompo: la alte politikema, desupra, maltransparenta procezo por fari decidojn estas prezentata kiel “nepolitika”, “teknika", ”procedura”, “neŭtrala” kaj, jes, “demokratia”. Ĝia vera celo estas malhelpi tion, ke la Eŭropa loĝantaro efektivigu demokratian kontrolon rilate al siaj komunumoj, laborejoj, medioj, mono, teknologioj kaj influo-povo sur la resto de la mondo. Kruda ekspluatado de homoj, bestoj kaj de nia planedo iĝas la kaŝita celo, la sola motivo, la sola kompaso.

La prezo de tiu ĉi trompo ne estas nur la fino de demokratio, sed ankaŭ la daŭra ekonomia malfortiĝo, socia stagnado, teknologia malantaueniro, ksenofobio kaj klimata detruado, jen terura kompleta fiasko de la eŭropa civilizo.

Devas esti alia vojo. Kaj ĝi ja ekzistas! Temas pri tiu, kiun la sola “oficiala Eŭropo” kontraŭstaras per ĉiu muskolo de sia aŭtoritatema pens-maniero: iu demokratia revolucio!

Nia movado, DiEM25, estis formita en Berlino la 9-an de februaro de 2016, cele alvoki al tiu revolucio. Ni alvenadis el ĉiu parto de Eŭropo, kaj el pli malproksime. Ni estas unuigitaj de niaj malsamaj kulturoj, lingvoj, parol-manieroj, aliĝoj al politikaj partioj, ideologioj, haŭt-koloroj, genraj identecoj, kredoj, kompetentecoj kaj opinioj pri la plej bona societo. La sola, simpla, radikala ideo, kiu unuigis nin, iĝis la fonda principo de DiEM25: Eŭropo demokratiiĝos aŭ ĝi diseriĝos!

De tiam, la sukceso de niaj regantoj ĉe la evitado de la eŭropa demokratiĝo konfirmis nian antaŭvidon: Brit-eliro, la nova orienta-okcidenta divido kiu emerĝis dum la fendo norda-suda pliprofundiĝis, la malhumana traktado de la rifuĝintoj, la forlasado de junularo kaj maljunularo, la patriarkeca forigado de la virinaj kaj GLAT-aj rajtoj al mem-difinado kaj libereco, la verd-purigado de la faroj faritaj de la industrio pri fosilia brulaĵoj - jen la heredaĵo de la tuteŭropa demokratia malvenko.

Demokratio signifas “regado fare de la multuloj”, kiuj estas, laŭdifine, tiuj pli malriĉaj. Ĝia malo estas oligarĥa sistemo, kiu signifas “regado far la malmultuloj”, laŭdifine la riĉuloj. Al la eŭropanoj oni diris, ke oni vivas en demokratioj, male al tiuj kiuj, je nia oriento, estas sub la prema polekso de slavaj oligarĥaroj. Tio estas mensogo. La regado far juro estas – dankinde - pli bone establita en Eŭropo sed, fakte, la eŭropanoj loĝas en akraj oligarĥaj sistemoj kiuj iam okazigas elektadojn, kies rezultoj estas ignorataj se ili kontraŭfrapas la interesojn de la eŭropaj oligarkoj.

En la ombro de tiu ĉi bedaŭrinda heredaĵo, DiEM25 estas nun ĝisdatiganta nian radikalan simplan ideon: por demokratigi Eŭropon, la popoloj devas faligi ĝian unuiĝintan oligarĥaron!

KIEL EŬROPO IĜIS SENDEMOKRATIA ZONO

Gvidata de la usona hegemonio kaj subtenata de la landaj indiĝenaj oligarĥaroj, la post-milita okcidenta Eŭropo kapitulacis antaŭ kompanio-grupo de financaj institucioj kaj pezaj industrioj (poste altirantaj bienulojn), kies dekomenca celo estis fiksi prezojn kaj redistribui la oligopolajn profitojn pere de burokrataro, kies bazo estas Bruselo. La rezultinta kompanio-grupo, kaj ties EU-aj administrantoj, timadis la popolojn kaj malŝatis la ideon pri regado fare de la popolo.

Pacience kaj laŭmetode, procezo pri sen-politikigado de la decido-farado estis efektivigata. Kio rezultis? Gravaj decidoj de niaj parlamentoj por iu sendemokratia Eŭropa zono estis decidoj kovritaj per ia trempanta ŝajn-teknokrata fatalismo. Naciaj politikistoj estis malavare rekompencitaj pro sia komplica konsento. Iu ajn kiu oponas al tiu sen-politikiga procezo estas enklasigita “mal-eŭropeca” kaj traktata kiel minaco por la eŭropa unuiĝo!

La kreado de la monunuo eŭro montris historian momenton: neniam antaŭe, de kiam kapitalismo enradikiĝis, iu oligarĥa sistemo atingis, tiel decide, senigi registarojn de la iloj pere de kiuj esence redistribui enspezon kaj riĉecon. Jen monunua unio de la oligarĥoj por la oligarĥoj, kie neniu ŝtato rajtas tuŝi ilian pririĉecan akumuladon, jen iu oligarĥa revo iĝinta vero. La timo de Margaret Thatcher [magaret taĉa], ke eŭro estas “federacio tra la malantaŭa pordo“, estis tute mismetita. Kial endanĝerigi ilian imunecon disde demokratio pere de la konsiderado de federacia registaro demokratie elektita?

La katastrofo de 2008 ekellasis bankan senbremsan falon, por kiu la oligarĥa eŭro ne estis fasonita. Kiam la tutmondaj bankistoj unuiĝis por devigi registarojn savi ilin, kontinentaj eŭropaj registaroj estis gvidataj transdoni la bankistajn perdojn al la plej malfortaj eŭropanoj: socialismo por bankbanditoj akra registara ŝparemo por la homamasoj. Kio rezultis? Enorma revigliĝo de la antaŭekzistantaj fendoj inter norda kaj suda Eŭropo, inter orienta kaj okcidenta Eŭropo, inter Bruselo kaj Londono kaj -kompreneble- inter la posedantoj kaj la neposedantoj en ĉiu lando.

Tiel baldaŭ kiel la eŭropa krizo eksplodis, la Brusela kompanio-grupo, la Eŭropa Centra Banko, ECB, ĉiuj potencoj de Eŭropo, kune kun la Internacia Mona Fonduso (IMF), sendis armeojn de burokratoj por konfiski la propraĵojn, la pensiojn kaj ĉiujn restantajn havaĵojn de la plej malfortaj homoj. Ili maskovestis la egan bankan elsavadon kiel solidarecon al la grekoj, la irlandanoj, la portugaloj, ktp, kiam, fakte, temis pri solidareco al bankbanditoj, la plej bankrotaj kaj koruptaj de la banka sektoro.

Kiam la grekoj surscenigis sian grekan printempon kaj balotis por diri “Ne” al la transnacia oligarĥaro, ilia demokratio estis forbalaita. Ekde tiu momento en 2015, la skribaĵo daŭre restas surmure: Al demokratio oni ne povas permesi ŝanĝi ion ajn, kion la oligarĥa sistemo volas konservi!

Por tiu ĉi celo, niaj oligarĥaroj-sen-landlimoj estas daŭre kunlaborantaj por turni fierajn pacemajn popolojn unu kontraŭ la alia: nordaj kontraŭ sudaj eŭropanoj, orientanoj kontraŭ okcidentanoj, ĉiuj kontraŭ la fremdaj “aliuloj”. Eĉ ene de la politika maldekstro, granda divido stariĝis inter tiuj, kiuj volas forlasi la eŭron, aŭ EU-on, kaj tiuj, kiuj tion ne volas. La familiara strategio “dividu kaj regu” permesis al la oligarĥaro, kiu kaŭzis la krizon, eblon prezenti sin kiel la solan savanton kaj rimedon.

Oligarĥaj potencoj pliprofundiĝas per la rekrutigado de teknologioj nubaj de kompanio-grupoj, bazitaj je artefarita inteligento, celantaj privatigi sano-servojn, edukadon kaj ĉiujn restantajn komunaĵojn, tute male ol gvidi teknologion por la socia servado. Neniam maltrafante iun ajn eblon ekspluati krizon (ekz. pandemion, militon ĉe la eŭropa periferio) nia eŭropa oligarĥaro trovas manieron grandskale por altigi elspezojn pri siaj plej ŝatataj kontraŭhomaj teknologioj (de kontrol-inspektado ĝis milit-armado) samtempe altrudante akran ŝparemo al la plimulto de la eŭropanoj kaj al nia natura medio.

Jaron post jaro la triumfanta oligarĥaro montras sin preta kaj deziranta ĉion ŝanĝi, se tio necesas por certigi ke ĉio... restos same!

KIAL DiEM25?

DiEM25 emerĝis kiam la eŭropaj krizo kaj malforiĝo iĝis ne plu ignoreblaj: la bankbanditoj unuiĝis tra la landlimoj por certigi sian savadon. La eŭropaj politikaj politikaj regantoj estis komplotantaj por pagi tiujn permonajn savojn pere de altrudado de tut-eŭropa ĝenerala ŝparemo. Rasistoj, eĉ absolutaj faŝistoj, estis re-levantaj siajn malbelajn kapojn . Cele ilin haltigi kaj eviti tion, ke la eŭropaj potencoj neinversigeble dividu kaj regu sur la Eŭropaj popoloj, la 9-an de februaro 2016 ni starigis DiEM25-on, la unuan transnacian movadon en la eŭropa historio. Nia ideo estis evidenta: financuloj, burokratoj kaj ekstremuloj unuigis siajn manojn tra la landlimoj. Alvenis la momento por ke progresemuloj faru same.

Nia 2016-a Manifesto estigas radikan eliron disde la pigra kaj ege ofendema rakonto pri iu kolizio inter la Germanujoj kaj la Grekujoj de Eŭropo, inter la nordaj “formikoj” kaj la sudaj “cikadoj”. Anstataŭ tio, ĝi klarigis tion, ke Eŭropo estis dispeciĝanta (prognozo kiun la Briteliro konfirmis monatojn poste) ĉar iu ĉiopova alianco de la oligarĥaj cikadoj (kaj nordaj kaj sudaj) estis malŝarĝantaj siajn vetludajn perdojn sur la malfortigitaj ŝultroj de la peze laborantaj formikoj (kaj nordaj kaj sudaj).

Nia 2016-a Manifesto klarigis, ke ksenofobio, fremdul-malamo, estis la spegulado de la klasa milito lanĉita de la transnacia eŭropa oligarĥaro kontraŭ tiuj neprivilegiaj loĝantoj en ĉiu eŭropa lando. Ĝi priskribis kiamaniere tiuj ekstrem-dekstruloj kaj la oligarĥaj pajlohomoj estis la kontraŭaj flankoj de la sama monero. Ĝi montris, ke ili bezonis unuj la aliajn, tiel, ke la oligarĥaj pajlohomoj altrudadis la ŝparemon kiu naskis la malkontenton kiu nutris la ekstrem-dekstrularon, dum la antaŭvido, ke ekstrem-dekstruloj atingos registarajn postenojn okazigis tion, ke balotantoj daŭre balotis favore al la oligarĥaj pajlohomoj.

Nia 2016-a Manifesto provizis la fondadon de diversaj ŝlosilaj novaĵoj kiuj igis DiEM25-on nova movado.

Aktivanta transnaciismo
Ĉiu politiko, eĉ se temas pri io specifa al unu regiono aŭ lando, estas decidota de voĉdonado far tut-Eŭropa tut-membraro, igante DiEM25-on vera unueca transnacia movado.

Konstruema malobeo
Ni devontigas nin malobei ĉiujn etike kaj politike neakcepteblajn politikojn aŭ gvidliniojn de la nuna stato de aferoj; ekz. ŝparemon, elfosadon kaj bruligadon de fosiliaj brulmaterialoj, sed ni ankaŭ engaĝas nin por surtabligi alternativajn gvidliniojn, politikojn kaj proponojn kiuj estas konstruemaj (t.e. raciaj, moderaj) kaj havos la eblon, eĉ ene de la nuntempa kadro, reale plibonigi la vivojn de la multuloj; ekz. la DiEM25-a tutampleksa Nova Verda Pakto por Eŭropo, kiu estis disvolvita kiel kunlaborema strebo de sennombraj eŭropanoj kontribuantaj el multaj malsamaj landoj.

Racia furiozo
Ĉu ni atendu ke la eŭropa oligarĥaro subtenu niajn konstruemajn proponojn; ekz. la DIEM-an Novan Verdan Pakton por Eŭropo? Certe ne! Do, kial ilin proponi? Ĉar estas grave demonstri al la eŭropaj homoj, ĉefe al tiuj kiuj suferas en la hodiaŭa reĝimo, ke ekzistas realigebla alternativo al ilia suferado - alternativo kiun iliaj regantoj kaj iliaj gvidantoj elektitaj surbaze de “negocoj-kiel-kutime” blinde preterlasas. Nur armitaj per tiu ĉi realigebla alternativo, la koroj kaj mensoj de la multuloj estos plenigitaj de la racia furiozo kiu estas antaŭkondiĉo de la politika revolucio kiun Eŭropo bezonas.

Transformo, ne reformo
Reformismo estas alia vorto por komplica konsento aŭ kosmetika ŝanĝo, sen vera ŝanĝo. La hodiaŭa Eŭropo ne povas esti reformata, sed ĝi ja povas esti transformata pere de kolizio kaj renversado de ĝia oligarĥa sistemo, antaŭ ol konstrui aŭtentan demokration.

LA TASKO DE DIEM25

Multaj eŭropanoj malakceptas la ideon pri federacio. Ili malcedas pri la kunmetado de suvereneco. Ili timas, ke allasi pli da integrado ne estas favore al ilia intereso. Tiel longe kiel povo restos en la manoj de iu eta transnacia oligarĥaro, ili pripravas. Ĝis la hodiaŭo, tiuj, kiuj alvokas al “pli da Eŭropo”, preskaŭ ĉiam fakte celis diri pli da centrigita povo favore al la interesoj de la Eŭropa oligarĥaro.

La DiEM25-a tasko estas ilin konvinki, ke la solvo ne estas perfekte sigeli niajn naciajn landlimojn, ĉar tion fari ne evitos la perdon de ilia restanta povo.

La DiEM25-a devo estas ilin persvadi, ke la solvo estas la renversado de la eŭropa oligarĥaro pere de la for-ronĝado de ilia suvereneco, aŭtonomeco kaj libereco, rilate al la elekto de iliaj projektoj kaj partneroj.

La DiEM25-a respondeco estas forĝi transnacian aliancon tra Eŭropo - kaj pli malproksimen - kiu kapablos faligi la oligarĥaron kaj starigi instituciojn de aŭtenta, malcentralizita, partoprenema demokratio.

LA CELOJ DE DIEM25

Tradiciaj verdaj kaj maldekstraj partioj limigas sin mem al mistraktado kaj alĝustigado de la nuna sistemo. Multaj eksaj radikalaj partioj hodiaŭ konsideras virto la evitadon de grandaj alrigardoj kaj, anstataŭe, koncentriĝas pri demonstri ke ili estas pli taŭgaj mastrumantoj de la nuna sistemo, kies mastrojn ili serĉas trankviligi. DiEM25 ne zorgas pri tio.

Por demokratiigi Eŭropon, DiEM25 celas transformi la oligarĥan sistemon sub kiu la homoj sufer-laboras. Por tia transformado, kvar aferoj necesas. Plena kompreno pri kiel la nuna sistemo funkcias. Antaŭvido de alternativa ekonomia sistemo, per kiu oni anstataŭigos ĝin. Ĝenerala plano por demokratia regado. Projekto por altrudi nian planitan transiron al iu post-kapitalisma socio malgraŭ la kontraŭstaranta eŭropan oligarĥaro.

Nia nuna sistemo
Ni travivas tempon de transiro disde renta kapitalismo al io eĉ pli malbona, iu speco de teknologia feŭdismo: teknika-feŭdismo.

Niaj ekonomiaj celoj
Ni imagas plene malcentrigitan ekonomian sistemon bazitan sur kunlaboraj plat-administraj entreprenoj (bazitaj sur la principo de unu-persono-unu-akcio-unu-voĉo) antaŭenigantaj:

(1) malkreskon en sektoroj kiuj malutilas al homoj, aliaj bestoj kaj la medio (ekz. limigante la medimalpurigon, fabrikan terkultivadon, la reklamindustrion, la produktadon de cemento, la nombron da privataj aŭtoj, la industrian armean komplekson).

(2) La kreskon de renovigebla energio, publika sano, mensa sano, socia prizorgo, senlima edukado kaj kulturo.

(3) Senkondiĉan bazan enspezon kaj laborgarantion donitajn de demokratiigitaj centraj bankoj, en mondo, kie internacia komerco kaj monfluoj estas regataj por forigi malekvilibrojn (ekz. komercaj deficitoj/plusoj) kaj, en la proceso, fondi verajn verdajn kaj sociajn publikajn investojn en la malpli evoluintaj partoj de la planedo.

Niaj politikaj celoj
Ni agnoskas, ke eŭropanoj - prave - rezignis pri siaj politikistoj. Por povigi la eŭropanojn ni antaŭvidas novajn tavolojn de decidanta demokratio (ekz. demokratiaj konsilantaroj konsistantaj el hazarde elektitaj loĝantoj) inter la balotantoj kaj elektitaj reprezentantoj (ekz. Parlamento, lokaj kaj naciaj registaroj). Je tut-eŭropa nivelo DiEM25 estas engaĝita en serion de konstituciaj popolaj asembleoj - laŭ la sama principo de demokrataj diskutaj konsilantaroj - kiuj ellaboros demokratan konstitucion de Eŭropa Respubliko.

Niaj ciferecaj celoj
Ni antaŭvidas ciferecan komunejon, en kiu homoj plene posedas siajn donitaĵojn, platformoj nuntempe funkciantaj kiel ciferecaj feŭdoj estas socialigitaj, komercaj servoj aĉeteblas por modestaj sumoj (finante la "senpagajn" servojn kiuj, nuntempe, igas nin la varoj de granda teknika industrio) kaj Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu malpermesas ĉiujn aŭtonomajn AI-bazitajn armilojn, protektante la dignon kaj rajton de ĉiu homo.

Niaj celoj pri kulturo
Ni agnoskas, ke kulturo, en ĉiuj siaj esprimformoj per arto, muziko, pensado kaj sporto, povas esti potenca ilo por ŝanĝo. Ni vidas kulturon kiel nepre partoprenan kaj inkluzivan rimedon por socia transformo. mé ta: la Centro por Post-kapitalisma Civilizo estas la internacia arta kaj kultura bazo por DiEM25, kunordiganta sin kun MeRA25 kaj la Progresema Internacio. Per arto kaj esplorado, argumentado kaj poezio, mé ta strebas helpi la socion rompi kun malgaja donaco por repensi la mondon. Kun la ideoj kaj misio de DiEM25 ĉe la avangardo, mé ta okupiĝas pri la diagnozo de nia nuna epoko kaj formulas starpunkton por postkapitalisma estonteco pere de la arto, kaj iĝante bazo por prezentoj, kampanjoj, babiladoj kaj konversacioj.

Nia plano por ŝanĝo
DiEM25 devigas sin forĝi larĝajn aliancojn kun movadoj, kiuj kundividas nian metodon de Konstrua Malobeo kun la celo meti la popolon (greke: demos) en Demokration ĉie. Ni faros tion en ĉiu kvartalo, laborejo, urbo kaj regiono. Sed, por ŝanĝi Eŭropon ni devas ankaŭ ŝanĝi la registarojn servantajn la interesojn de la oligarĥaro. Kie tio necesas, DiEM25 starigos sian propran politikan partion (MERA25) por partopreni ŝlosilajn elektojn. En aliaj landoj ni kontribuos al balotaj aliancoj kongruaj kun ĉi tiu Manifesto. Programe, DiEM25 dependos de nia mezperspektiva politika tagordo (la Verda Nova Interkonsento por Eŭropo) same kiel de nia longperspektiva starpunkto de demokrata, ekologia, virinisma, paca, ne-ekspluata sistemo, kiu estas libera de kapitalismaj estroj, regantaj ŝtataj burokratoj kaj ajna tendenco al koloniigo.

NIA ALVOKO

Ni alvokas homojn en Eŭropo kaj ekstere aliĝi al ni por, kune, ĉesigi la atakon de aŭtoritatismo en ambaŭ ĝiaj "liberalaj" kaj popolismaj variantoj.

Ni invitas konsciencajn homojn agnoski, ke ni kune kapablas malkonstrui la paperan tigron, kiu estas la hodiaŭa ŝajne nevenkebla eŭropa oligarĥaro.

Ni proponas homojn, kiuj kundividas niajn celojn, labori senlace ĝis Profunda Demokratio disvastiĝos en la kompanian sistemon, nian monan kaj kreditan sistemon, niajn lokajn konsilantarojn, niajn parlamentojn, niajn registarojn kaj ĉiujn niajn institucioj n - kaj kulminos en transformitan Eŭropan Union.

Ni instigas la publikon vidi, ke tio, kio komenciĝas kiel nura opozicio al socialismo-por-bankistoj kaj ŝparemon-por-la-cetero, produktos mondon, kie nia altnivela teknologio funkcias por helpi nin kontroli niajn vivojn, funkciigi niajn korporaciojn laŭ la bazo de unu-membro-unu-akcio-unu voĉo, por fondi Debatajn Demokratiajn Konsiliojn, kiuj redaktu leĝaron por ke niaj Parlamentoj aprobu; kaj eĉ taksi la socian kaj ekologian taŭgecon de korporacioj kaj aliaj institucioj.

Nia alvoko al senpovigitaj kaj ekspluatitaj amasoj, kiuj estas konstante tenitaj malantaŭe, estas jena: Unuiĝu por agi! Ni havas nenion gravan por perdi. Sed ni havas kontinenton por gajni!

NIA PROMESO

Nin inspiras la vido pri ne-ekspluatema Eŭropo, kiu nutras Racion, Liberecon, Toleremon kaj Imagopovon ebligitajn de vera Solidareco, ampleksa Travidebleco kaj aŭtentika Demokratio. Ni aspiras al:

1. Demokratia Eŭropo, en kiu ĉiu politika aŭtoritato devenas el la suverenaj popoloj de Eŭropo

2. Postkapitalisma Eŭropo, kiu praktikas demokration en la laborejo kaj en ĉiuj aspektoj de vivo, ne nur en balota politiko

3. Sociala Eŭropo, kiu flegas ne nur liberecon disde enmiksiĝo, sed ankaŭ la bazan enspezon, zorgon kaj varojn, kiuj liberigas onin de bezono kaj ekspluatado

4. Daŭrigebla Eŭropo, kiu vivas laŭ la rimedoj de la planedo, minimumigante ĝian efikon sur la medio per harmonia kunvivado kun ĉiuj vivantaj estaĵoj, konservante kaj restarigante la vivdiversecon, forigante poluon, kaj lasante ĉiujn fosiliajn brulaĵojn profunde en la tero

5. Ekologia Eŭropo, kiu gvidas verdan kaj justan transiron tutmonde

6. Internaciisma Eŭropo, kiu traktas neeŭropanojn kiel valorajn en si mem (ne kiel iloj por iu celo) kaj laboras en aktiva solidareco kun ekspluatataj popoloj tutmonde

7. Unuiĝinta Eŭropo, kies popoloj montras tiom da solidareco inter nacioj, kiom ili faras interne

8. Pluralisma Eŭropo de regionoj, etnoj, nacioj, lingvoj, filozofioj kaj kulturoj, kie oni povas esti samtempe eŭropa kaj patriota

9. Diversa Eŭropo, kiu festas diferencon kaj finas ĉiun diskriminacion bazitan sur socia klaso, edukado, sekso, haŭtkoloro, aĝo, nacia deveno, filozofio, kredo, handikapo aŭ seksa orientiĝo

10. Malcentrigita Eŭropo, kiu uzas centran potencon por maksimumigi demokration en urboj, komunumoj, regionoj kaj ŝtatoj

11. Transnacia Eŭropo, en kiu politika reprezentado transpasas naciajn limojn

12. Travidebla Eŭropo, kie ĉiuj decidoj okazas sub la kontrolo de la civitanoj

13. Suverena Eŭropo, kiu utiligas sian hejman teĥnikaron por servi la solidarecon

14. Honesta Eŭropo, kiu serĉas brilan estontecon sen kaŝi sian imperiisman pasintecon

15. Kulturita Eŭropo, kiu utiligas la riĉan kulturan mozaikon de sia popolo kaj reklamas ne nur sian valoregan kulturan heredaĵon sed ankaŭ la laboron de la malsampensaj artistoj, muzikistoj, verkistoj kaj poetoj de Eŭropo, kiuj kontribuas al progresema demokratio

16. Kreema kaj Teknologie Suverena Eŭropo kiu liberigas kaj protektas la novigajn potencojn de la imag-kapablo de siaj civitanoj

17. Paca Eŭropo malaltiganta streĉitecojn en siaj orientaj, mediteraneaj kaj egeaj regionoj, finante siajn koloniajn projektojn en la Proksima Oriento, Afriko kaj aliloke samtempe aganta kiel bastiono kontraŭ la sirenoj de militismo kaj ekspansiismo ĉie

18. Malfermita Eŭropo, kiu estas vigla kaj alloga por ideoj, homoj kaj inspiro de la tuta mondo, rekonante barilojn kaj landlimojn kiel signojn de malforteco kiuj disvastigas malsekurecon en la nomo de sekureco

19. Bonvenigema Eŭropo, kiu agnoskas, ke post jarcentoj, dum kiuj eŭropanoj koloniigis aŭ regis la politikon de la cetera mondo, nun necesas bonvenigi migrantojn kaj rifuĝintojn

20. Liberigita Eŭropo, kie privilegioj, antaŭjuĝoj, senigo kaj minaco per perforto forvelkas, ebligante homojn en Eŭropo kaj alie naskiĝi en malpli klišaj roloj, ĝui egalajn ŝancojn evoluigi sian potencialon, kaj esti libera elekti pli da siaj partneroj en ĉiuj aspektoj de vivo, laboro kaj socio

Aliĝu al ni. Carpe DiEM25!